

Societo por Internacia Lingvo Esperanto en Radio

Claude Gacond, 388-a radioprelego, 1971.03.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Niaj geaŭdantoj gesinjoroj Iva kaj Lennart Aberg en Gotenburgo, Svedio, starigis Societon por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio. Ni bondeziras al tiu nova societo longan kaj efikan vivon.

A.- Sinjorino Iva Aberg laboras kiel redaktorino. La *Bulteno Inter*, kiun ŝi redaktas, aperas nur unufoje en la jaro. Hodiaŭ ni legos al vi erojn el la pasintjara ekzemplero, numero dua, kiu estis eldonita en aŭtuno 1970.

Cl.- Jen kiel gesinjoroj Iva kaj Lennart Aberg difinas sian laboron : « *Ni dekomence celas prezenti al vi praktikajn konsilojn kaj rakonti pri funkciado de radiodisaŭdigoj el teknika flanko, kiun vi necese konu por povi bone kapti la Esperanto-staciojn kaj kiel eble plej bone sekvi ilin. Vi havos eblecon lerni pli pri la fenomeno de radio-ondoj, kio influas ilin, kiel aranĝi vian ricevilon, kiel serĉi la diversajn staciojn, ktp...* » (Fino de la citaĵo) La artikoloj estas skribitaj en populara stilo, do certe kompreneblaj ĝuste por tiuj, kiuj ne ĉiutage okupiĝas pri la radiofonio.

A.- INTER, la Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio jam havas membrojn en 17 landoj. Ĝi celas malfermitan laboron. Jen kion tiurilate skribas la redaktorino Iva Aberg :

Cl.- « *La plej ofta zorgo de esperantistoj, kiuj organizas [...] kampanjojn, estas, ke ili ne aspektu organizitaj. Oni volas, ke la leteroj atingu la koncernajn radiostaciojn kvazaŭ hazarde, iom post iom, por ke aspektu « nature ». Organizati alskribojn al la celata radiostacio tiamaniere estas preskaŭ neeble. Krom tio la esperantistoj grandparte ne interesiĝas pri similaj agadoj.* »

A.- Tiu vidpunkto estas tute prava.

Cl.- Poste la redaktorino raportas pri kampanjo organizita en Svedio. Aŭdu :

A.- « *La kampanjon en Svedio ni organizis eĉ tiel, ke ni atentigis la Radion de Svedio, ke ni petas la esperantistojn en la mondo skribi al ili, ĉar ni scias, ke multaj havus intereson aŭskulti Esperanto-dissendojn el Svedio. Post kelka tempo estis la sveda radio superŝutita de tiom da leteroj, ke la redakcio kunvokis specialan kunsidon, kie oni tre serioze pritraktis la enkondukon de la Internacia Lingvo en la programojn por eksterlando. Oni intencis doni al ĝi 20-30 minutojn ĉiusemajne, sed pro objektivaj malfacilaĵoj (antaŭ ĉio la buĝeto kaj la tempomanko) tio montriĝis nerealigebla. Oni pridiskutis ankaŭ la eblecon de iaspekaj anguletoj de Esperanto (kiel en la Pola Radio) enkadre de alilingvaj programoj. Sed tio ne montriĝis sufiĉe taŭga pro la jam nuna mallongeco de tiuj programoj. Tamen la pordo por la Internacia Lingvo restis post tiu kunsido malfermita.* »

Cl.- Tiuj klarigoj ŝajnas al ni tute objektivaj. Ne estas tiel facile enkonduki novan lingvon apud la plej uzataj. Kaj tiom longe kiam la esperantistoj ne estos pli multnombraj, tiam esperanto ĉe la radio restos duagrada lingvo, kiu estas lokigita inter la normalaj programoj, kiam tiu lokigado montriĝas ebla. Ekzemple tio estas la kondiĉoj en Svislando. La graveco tiam estas daŭrigi tiujn elsendojn, akirigi al ties kronikistoj normalajn rajtojn.

A.- Post tiu ĉapitro dediĉita al kampanjoj sekvas ĉapitro dediĉita al teknikaj demandoj. Kaj por la aŭskultantoj de la esperanto-elsendoj la ĉefaĵo estas scii, kiel disvastiĝas la radio-ondoj, kaj inter ili la kurtaj ondoj. Tial al tiu disvastiĝo estas dediĉita la teknika parto de tiu dua numero de la *Bulteno Inter*, gazeto de la Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio.

Societo por Internacia Lingvo Esperanto en Radio
Claude Gacond, 388-a radioprelego, 1971.03.17 & 20

Cl.- Jam plurfoje ni parolis pri tiu temo, ĉar tre ofte venas demandoj de geaŭdantoj pri la disvastiĝo de la kurtaj ondoj. Pro tio ni profitas tiun okazon por legi al vi erojn el tiu ĉapitro. Pere de tiuj klarigoj vi eble pli bone komprenos, kial foje la aŭdado ne estas tre bona. Vi eble trovos rimedojn por plibonigi la aŭdkapablon de via aparato. Kaj eble vi deziros ricevi tiun bultenon, kiu alportas tiujn utilajn informojn. Jen ni komencas citadon :

A.- « *El la anteno de la sendilo direktas sin du specifaj ondoj, **laŭtera ondo** kaj **spaca ondo**. La laŭtera ondo atingas la ricevilon rekte kaj havas limigitan etendon, depende de la sendila efikeco kaj de la frekvenco.*

Cl.- *Se la sendilo uzas malaltan frekvencon (longajn ondojn) la laŭtera ondo etendas sin relative sur longa distanco ; sendilo kun alta frekvenco (kurtaj ondoj) havas mallongan etendopovon, ekzemple 10 ĝis 100 kilometroj, ankaŭ depende de survojaj baroj (montoj, altaj konstruaĵoj, ktp.*

A.- *La spaca ondo, precipe tiu de kurt-onda stacio, praktike venkas kiom ajn grandan distancon. Tiuj ondoj ne iras rekte de sendilo al ricevilo, sed ili iras tra la spaco, kie specifaj tavoloj reflektas ilin.*

Cl.- *Tiel la spacaj ondoj revenas al la tero, resaltas denove al la spacaj tavoloj, tiel saltante tien kaj reen plurfoje.*

A.- *La suno elsendas ultraviolan radiadon. Kiam tiuj radioj enpenetras la supran atmosferon (jonizsferon) estiĝas tavoloj de jonizitaj gasoj. Tiuj tavoloj pli malpli povas reflekti la radioondojn. Oni ĝenerale parolas pri kvar (eventuale kvin) similaj tavoloj. Post reflektado la diversaj radioondoj sekve revenas al la tero, kie ili estas kapteblaj per la ricevilo.*

Cl.- *Sed unu grava kondiĉo por sukcesa kaptado de iu stacio estas ankaŭ iu minimuma distanco inter sendilo kaj ricevilo. Proksime al la sendilo la laŭtera ondo povas esti kaptebla, sed alie oni dependas de la spaca ondo, kies reflektadoj pro transsalto ne ĉiam trafas la ricevilon. »*

A.- La venontan semajnon ni revenos al tiuj klarigoj, kiujn vi povos relegi en *Bulteno Inter* de la Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio, Gotenburgo, Svedio.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-